Fontos tudnivalók

Szótár használható ebben a vizsgarészben.
Piszkozat – a vizsgarészre fordítható idő miatt inkább vázlat – készíthető.
A 2. feladatban a két téma közül csak az egyiket kell kidolgozni.
Munkaidő: 90 perc

1.
Vi tre ŝatus vidi programon en la televido posttagmeze, sed vi devas iri al la dentkuracisto, ĉar via dento ege ekdoloris vin.
Lasu mallongan leteron por via frat(in)o kaj petu, ke li/ŝi registru vidbende la programon.
Redaktu vian 100-120 vortan leteron en kiu

- **skribu, kio okazis al vi**
- **petu lian/ŝian helpon**
- **precize skribu kiam kaj kion vi deziras vidi**
- **klarigu, kial gravas al vi tiu programo**
- **danku lian/ŝian helpon kaj promesu iun donacon!**

Skribu vian leteron sur la unuan respondfolion!

2. Elektu unu el la sekvaj temoj kaj faru la taskon!

2.1. Vi devas skribi al via lerneja gazeto pri internaciaj klas- aŭ grupinterŝanĝoj.
Vi kolektis kelkajn opiniojn inter viaj samklasanoj, laŭ kiuj vi faros la artikolon.

„Estis la unua fojo, ke mi parolis kun vera italo. Komence mi nenion komprenis, sed li estis tre pacienca, kaj mi multe progresis." (Suza)
„Mi timas esti sola ĉe nekonata familio. Mi ne volas partopreni tian interŝanĝon." (Manjo)
„Unue la francoj venis al ni. Mia korespondamiko jam skribis e-poŝtan mesaĝon, ke ili atendas nin kaj faris por ni same amuzan programon, kiel ni al ili." (Karlo)
„Bedaŭrinde mi povas akcepti neniun hejme." (Ĝina)
„Neniam plu mi volus interŝanĝon! Mi malsatis dum la tuta semajno ĉe ili." (Ronjo)
„Kiam mi gastigis iun, ŝi volis pasigi la tempon en drinkejoj, ĝis la noktomezo. Miaj gepatroj estis tre maltrankvilaj." (Blanka)
„Ili ĉiam volis esti kune, kaj tute ne parolis kun ni." (Tomo)
„Estis tre interese vidi, kiel funkcias lernejo en Francio." (Peĉjo)
„Por mia familio estas iom multekosta tiu interŝanĝo, sed alimaniere mi ne povus vidi Anglion. Mi ankoraŭ neniam estis tie, kvankam mi lernas la anglan ekde ses jaroj." (Judita)

Skribu vian artikolon! En via kontribuo

- **difinu, kio estas grupinterŝanĝo**
- **prezentu la pozitivajn flankojn laŭ la supraj opinioj**
- **klarigu la malavantaĝojn laŭ la supraj opinioj**
- **rakontu detale pri viaj spertoj, se vi havas.**
  Se ne, rakontu kion vi aŭdis de aliaj pri tiu temo.
- **donu vian propran opinion!**

Redaktu 200-250 vortan tekston!
Skribu ĝin sur la duan respondfolion!

2.2. Via eksterlanda korespondamik(in)o plendas, ke li/ŝi estas dika.
(Vi renkontis lin/ŝin persone antaŭ unu jaro,)
Ŝi/li petas vian konsilon, kion fari. En via respondo

- **reagu ĝentile al la problemo, demandu detalojn**
- **kuraĝigu lin/ŝin ŝanĝi la vivmanieron, proponu al li/ŝi iun sporton**
- **rakontu pri viaj spertoj**
- **prezentu kelkajn opiniojn de hungaroj pri la graveco de la korpa aspekto**
- **donu vian propran opinion!**

Redaktu 200-250 vortan leteron!
Skribu ĝin sur la duan respondfolion!

1.	2.	3.

Unua respondfolio

1. Tartalom és szöveghossz (5 pont)	
Szövegalkotás (3 pont)	
Formai jegyek és hangnem (2 pont)	
2. Szókincs, kifejezésmód (5 pont)	
3. Nyelvhelyesség (5 pont)	
Az 1. feladatban elért dolgozatpont (Max. 20)	
Elért vizsgapont (dolgozatpont/2) (Max. 10)	

Dua respondfolio

1.	2.	3.

1.	2.	3.

1. Tartalom és szöveghossz (5 pont)	
Szövegalkotás (5 pont)	
2. Szókincs, kifejezésmód (5 pont)	
3. Nyelvhelyesség (5 pont)	
A 2. feladat összpontszáma (Max. 20)	